2-a Jaro, N-o 15 (67)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

7. Januaro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Kuraĝon en la nova jaro!

Jam komenciĝis la nova jaro kaj kelkaj tagoj jam pasis. Ni ne partoprenas, akcelante tiun malnovan tradicion, gratulante kaj bondezirante al niaj gekamaradoj feliĉon en la nova jaro. Ni ja estas tute konsciaj pri iliaj proleta sorto kaj mizeraj cirkonstancoj, kiuj neniam ebligas efektivigi feliĉan kontentigan vivon. — La vivo por tutmonda proletaro estas batalo, kaj tiu batalo ne finiĝos antaŭ ol ne okazos ŝanĝo en nuna sociordo.

Senlaboreco, striko kaj lokaŭto estas la akompanantoj de la laboristaro, ĉiam pli mizerigantaj ilin.

Paco estas ĉiam proklamata; tamen efektive evidentiĝas, rigardate de l' mondperspektivo, ke ĉiam unu ŝtato konkuras la alian.

Momente klare montriĝas la *antaŭeniĝo* de Anglio. Dum multaj jaroj la duelo de angla imperialismo kun la franca estis la bazon donanta fakto sur la eŭropa ŝakbreto. La financkrizo malfortigis Francion.

En Locarno ĝi perdis sian hegemonian pozicion kaj translasis ĝin al Anglio.

Anglio ĉiam pli enpenetras en la kontinentajn cirkonstancojn kaj havigas al si ekonomian bazon sub ĝia politika hegemonio. Malantaŭ Anglio ĉiam pli kaj pli potence leviĝas la konturoj de Ameriko. Ĝi ĉiam, paŝon post paŝo eliras el embusko kaj enmiksiĝas en ĉiujn aferojn de l' mondo. Jam oni povas diferenci en malproksimo *konturojn de nova, kreskanta mondantagonismo* kiu multe superos, je giganta grandeco la antaŭan anglo-francan: la angla-amerikan antagonismon.

En la *ĉina politiko* Ameriko kaj Anglio kuniras por post mallonge denove disiri. En Sud-Amerikon enpenetras Anglio. Inter Anglio kaj Ameriko la fokusoj ĉiam pli akriĝas.



Tio ĉio nur estas komenciĝo. Kun nehaltigebla rapideco la mondevoluo ŝoviĝas pluen kaj naskas novajn formojn de kapitalistaj antagonismoj. Ameriko jam levas sian kapon kiel plej altan pinton de kapitalista evoluo larĝe super ĉiuj siaj konkurantoj. En malkaŝe giganta formo ĝiaj fortoj vastiĝas interne de eŭropaj ŝtatoj. La mondantagonismoj ĉiam pli pintiĝas. Ili ĉiam pli profunde, ĉiam pli larĝe disŝiras la kapitalistan mondon. Novaj ekzamenoj atendas la popolojn de la tero.

Ĉiuj tiuj faktoj trudas al ni SAT-anoj, ke ni ariĝu kaj pli densigu niajn vicojn kaj forĝu, forĝadu por ŝtaligite, hardite kontraŭstari la atakojn de la kapitalista al nia proleta fronto.

En tiu rilato donas direktivojn la gvidrezolucio de la V. SAT-kongreso. Laŭ ĝi harmonia laboro sur lingva kaj organiza bazo estas interkonsentita. Finfine nia oficiala organo "Senn." kontribuu al tio. Ĝi fariĝu la parolilo de l' tutmonda prolet-esperantistaro. Dum la unua jaro de sia vivo Senaciulo sciigis pri diversaj severaj kritikoj, kiujn la Redakcia Komisiono klopodis eviti kaj surprenis la taskon, fari ĝin tia, ke ĝi interesos la SAT-anaron, kiu ankaŭ zorgu sian parton, varbante kaj kunlaborante al plua progreso.

Ĉi-loke ni ankaŭ ne volas preterlasi al ĉiuj niaj kunlaborantoj esprimi nian dankon kaj samtempe esperon, ke ili ankaŭ en la nova jaro 1926 daŭrigu la kunlaboradon kaj subtenon por nia movado. Nur per unuigitaj fortoj ni venos al celo en nia komuna batalo.

En tiu senco ni ankoraŭfoje vokas al niaj gek-doj: kuraĝon en la nova jaro!

Antaŭen sen tim' laboristoj
al la kara, batala labor'! *Red. Kom.*

Letero el Svedio

En Svedio nun ekzistas demokrata reĝimo. La registaro estas socialdemokrata. Socialdemokrataj kaj liberalaj parlamentanoj kune konsistigas la plimulton en la parlamento. Tial estas decidite iom malmultigi la militistaron. Oni decidis forigi kelkajn regimentojn. Pro tio nun la reakciuloj kaj iliaj presorganoj tre furiozas. Ĝis la plena naŭzo ili ĉiutage remaĉas pri la granda danĝero, kiu minacas ilian karan patrion, kiam la decido estos efektivigita. Kaj ili ĉiurimede provas, se eble nuligi la decidon. Interalie ili fondis maskitajn faŝistorganizaĵojn. Unu estas nomata "Riksförbundet för Sveriges försvar" = La regna asocio por defendo de Svedio. La reakcia gazetaro ĉiutage alvokas por aligi membrojn en la asocion.

Sur la laborlokoj la profesie organizitaj laboristoj estas devigataj batali ne nur kontraŭ la mastroj ĉe konfliktoj, sed ankaŭ kontraŭ la multaj strikrompantaj bandaĉoj, kiuj estas organizitaj kaj okupas la laboron. Okazis lastatempe, eĉ pro demonstracio kontraŭ la strikrompantoj, ke laboristoj estis kondamnitaj je severaj punoj de la juĝistaro. Sed friponaĵoj de la strikrompantoj ne estis kondamnitaj.

La svedaj industrilaboristoj estas relative bone organizitaj profesie. Sed restas ankoraŭ precipe el la kamparlaboristoj granda maso, kiu ne estas organizita. Ekzistas du centraj proforganizacioj: "Landsorganisationen" = Tutlanda sindikatfederacio laborista, kiu estas reformisma kaj havas ĉirkaŭ 360000 membrojn, kaj "Sveriges arbetares centralorganisation" = Centra organizaĵo de la svedaj laboristoj, kiu estas sindikalista asocio kaj havas ĉirkaŭ 36000 membrojn. Krom tio troviĝas pli ol 30 laboristaj sindikatoj memstaraj kun ĉirkaŭ 70000 membroj.

Kompreneble pro tio, ke la tuta laboristaro ne estas konforme organizita, la batalo kontraŭ la laboraĉetantoj kaj strikrompantoj ne povas esti tiel efika, kiel estas dezirinde. Eĉ la apartaj organizacioj laboristaj interluktas reciproke.

Por forigi tiun ĉi malbonstaton sur la profesifaka kampo kaj diskuti pri starigo laŭ industriprincipo unu solan laboristan konfederacion tutlandan, al kiu la nunaj asocioj aliĝu, kaj por efike kontraŭbatali la strikrompantojn kaj organizadon de la neorganizitaj laboristoj ktp. estas kunvokita al konferenco, kiu okazos en la urbo Göteborg en la fino de januaro 1926. La iniciativo por ĉi konferenco estas farita en Göteborg de sekcio n-o 41 de la metalindustrilaborista sindikato. Jam je fino de novembro anoncis sin pli ol 200 profunuiĝoj sendi delegitojn por partopreni la konferencon. Verŝajne multaj ankoraŭ sin anoncas partopreni, kaj oni devas esperi, ke la rezulto de tiu konferenco fariĝu grava etapo en la batalo por la svedaj laboristoj kontraŭ kapitalistoj kaj strikrompantoj.

Laŭ la oficiala statistiko la vivkostoj en Svedio nun estas 75 procentoj pli karaj ol en jaro 1914, dum la realsalajro de la laboristoj nur altiĝis je 25 procentoj. Pro tio la vivkondiĉoj de la laboristoj estas pli malbona ol en 1914.

Ekzistas ankaŭ senlaboreco por multaj laboristoj, kiuj pro tio havas ankoraŭ pli malbonan sorton.

Estas enkondukita okhora labortago laŭleĝa, provizore ĝis jaro 1927. Proksime kunveninta parlamentanaro decidos pri ĝia plidaŭrigo aŭ nuligo. La laboraĉetantoj kaj iliaj kunagantoj tre energie kontraŭas tiun ĉi leĝon. Laboristoj kontraŭe tre ŝatas ĝin kaj certe ne en la unua momento toleros ĝian eventualan nuligon. Tiaokaze ili certe ĝin okupas sur la laborkampoj per energia batalo por siaj rajtoj.

Karl Johansson.

El la plej libera respubliko de la mondo

Preskaŭ ne kredebla skandalo aktualiĝis en Germanio, kiu ĝis nun ne okazis en la historio de la homaro. La "plej libera respubliko", kies konstitucio komencas per la frazo: La potenco estas plenumata flanke de la popolo, volas rekompenci la iamajn regantojn. La mizero de la suferantaj masoj de tago al tago akriĝas timige.

La senlaboreco kreskegas, same ankaŭ la nombro de la fabrik-fermadoj. La prezoj de la plej necesaj vivrimedoj salte altiĝas. Ŝvelas ĉiusemajne la nombro de la memmortigoj, ĉar vivo ĉe ni estas tro "roza."

Tuberkulozo kaj amasmortiĝado inter la suĉinfanoj furiozas.

Ekkomencis ekonomia krizo longdaŭra, alportante mizeregon por la popolo. Sed dum la popolo malsatas, la iamaj regantoj ne hontas denove surpaŝi la vojon de rabemuloj. Malgraŭ la mizero ekzistanta, ekestiĝinte pro la Daves-plano, kiu kiel jugo premadas la nukon de la laboristaro, la kanajloj riskas postuli rekompencon en alteco de 2 1/2—3 miliardoj. La registaro kaj juĝistoj senhonte volas plenumi la postulojn de la forkurantaj aŭ forpelantaj superuloj.

Al la Hohenzoller [1]) oni jam 1919 enmanigis 70 000 000, por forigi la "plej grandan mizeron". Krom tio ili ankoraŭ ricevis kelkajn vagonojn plene de diversaj objektoj.

Depost la 1. januaro 1924 krom tio la iama imperiestro "englutas" 50000 markojn pomonate, kiel subvencion por senlaboreco.

Momente oni intencas reguli la aferon donante al ili kastelojn, domojn, bienojn kaj monon, kio kune valoras 1/2 miliardon. Plenumonte tion, diversaj ŝtatetoj certe bankrotiĝos. Ekzemple la malgranda Turingio devas rekompenci 7 eksregantojn.

Eĉ al kelkaj burĝaj gazetoj la postuloj estas tro impertinentaj kaj mem postulas leĝon, kiu malebligas la rekompencon.

[1]) Hohenzoller estas la nomo de la gento el kiu devenis la imperiestroj de Germanio.

Inter la laboristaro estas pro tiu okazintaĵo granda ekscito. Okazas ĉiuloke protestkunvenoj kaj demonstracioj. Protestkrioj trapenetras la landon, postulante popoldecidon por malebligi la rekompencon. La postulo de la laboristoj estas: konfisko de ĉiuj princdomoj kaj propraĵo, sen iu ajn rekompenco. Popolrajto superas princon.

Voko.

La laboro de la koloniuloj

(Laŭ *Ali Khamamu*)

Inter la multaj sekvoj, kiujn elvokis la mondmilito en Francio, unu el la pli gravaj en la politika, ekonomia kaj socia sencoj estas la alveno de laborforto el la kolonioj en metropolon.

La industria ekspansio, la intensa produktil-kolektado, la mankoj de homvivoj, kiujn suferis Francio pro la milito, jen faktoroj kiuj helpis la alvenon de laboruloj el kolonioj.

La teknik-perfektiĝoj permesas utiligi nekvalifikitajn metiistojn. Tial la burĝaro ĉiam ĝojis, trovante novajn labormanojn, pli malkarajn ol la eŭropanaj.

Aliflanke, la neo-feŭdalismo, la nekredebla ekspluatado en la kolonioj pelas indiĝenojn en la metropolon.

Laŭ la oficialaj statistikoj, publikigitaj de l' Paris'a municipalitato dec. 1923, en Francion almigris el Nord-Afriko 274164 homoj, el tiu kvanto 65000 laboris en Paris kaj la ĉirkaŭaĵoj.

En 1924, la vivkondiĉoj en la kolonioj ankoraŭ pli malboniĝis. La araboj ricevis nur 4—5 fr., kvankam laboris ili 14—16 horojn potage.

En Alĝerio, la malsato fariĝis kronika, kvankam la grundo estas tre fruktodona. Sed la grund-abundeco utilas nur al la ekspluatantaro, la kamparano malsatas. Kaj tio denove instigas la indiĝenojn elmigri. Fine de 1924 en Francio estis sendube ne malpli ol 500000 originuloj el Nord-Afriko.

Tio komencas timigi la burĝojn, kiuj maldeziras "senhonorigan interpuŝiĝon kun indiĝenoj" kaj zorgas pri la "sendanĝereco de la raso". Ĉiel la laboristoj el kolonioj estas malhelpataj en la almigrado. Ĉiaj formalaĵoj estas elpensataj por iel malhelpi ilian alveturadon. Oni postulas de l'indiĝenoj enmigrontaj Francion: 1) ateston pri dungiteco, viziita de l' labor-ministerio; 2) medicinan certifikaton kaj personan dokumenton (kun fotaĵo) de l' komunuma mero [1]); 3) ateston pri la moralaj virtoj(!); 4) dokumenton pri tio, ke la migremulo estas liberigita el ĉiaj devigoj aŭ servoj (civitaj, milita ktp.).

Kompreneble, ke la akiro de ĉi dokumentoj estas malfacila kaj multkosta. Tial ĝi efektive estas serioza malhelpaĵo por la formigremuloj.

Inter la indiĝenaj laboristoj en Francio, sub la influo de l' najbaraj fabrikaj aŭ uzinaj francaj laboristoj, altiĝas la konscio.

[1]) Komunumestro.

La indiĝenoj komencas interesiĝi pri batalo kontraŭ la kolonia politiko de l' registaro.

En multaj strikoj la arabaj laboristoj montris honorigan pruvon de klasa solidareco. Dum la strikoj ĉe la uzinoj de Say, Renaud, Gaz-kompanio Paris'a, Peugot & Michelin — en Monbeliard kaj Clermont-Ferrand; de l' dok-laboristoj en Le Havre, ankaŭ en Borinage'a striko (Belgio), la afrikaj laboristoj estis obstinaj multfoje kaj ilin ne rompis la entreprenistaj aŭ policanaj minacoj.

Por "reguligi" la laboron de l' afrikanoj *oficejo por indiĝenaj aferoj* estis kreita ĉe la Paris'a prefektejo. Marseille, Bordeaux, Toulouse, Clermont-Ferrand, Amiens, Ham, Le Creusot, Saint-Etienne havis la "feliĉon" rifuzi filiojn de tiu "estiminda" institucio, kie oficas koruptuloj kaj eks-ekspluatistoj el Nord-Afriko, bone konataj al la indiĝenaro.

Iom post iom estas forviŝataj la antaŭjuĝoj, kiujn havis la metropolaj laboristoj kontraŭ la indiĝenoj.

Sed ankoraŭ ofte, ĝis nun la vivkondiĉoj de l' indiĝenaro estas multe maldolĉigitaj pro la malŝata rilato de l' blankulaj laboristoj kaj de l' prof. sindikatoj. Ofte, oni rifuzas al la indiĝenoj sindikataniĝon, kaj tion en tre maldelikata formo. La malŝatvorto "bico" (bikó) tro ofte fluas el la buŝo de l' blankaj fratoj. (Vidu "Negro-laborista kongreso" Senn. 13—14).

La blankaj laboristoj kaj iliaj organizaĵoj devas pli atenti la indiĝenan demandon, kompreni kial la indiĝenaro estas dume nesufiĉe konscia kaj kultura, *ĉiam memori ke la proletigo de l' kolonianoj, alveturantaj metropolon, pligrandigas la nombron kaj la forton de l' proksim-estontaj tombistoj de l' kapitalismo.* Espigis V.

Pablo Iglesias — mortis

Dum la 9. tago de la nuna monato mortis en Madrid (Hispanio) la ĉefa gvidanto kaj fondinto de socialismo en Hispanio.

Li vivis 75 jarojn kaj luktis por socialismo 55. Filo de laborista familio, li estis devigata labori mane jam dum sia juna infaneco por subteni sian familion. Li laboris kiel presisto kaj fondis la internacian asocion de tiu metio. Li estis gvidanto de diversaj socialistaj ĵurnaloj.

En la ĵurnalo (El socialista) li estis direktoro, redaktoro, kaj ankaŭ presisto.

Li partoprenis kiel delegito ĉiujn kongresojn internaciajn socialistajn kaj en ĉiuj lasis bonegan rememoron pro siaj konsiloj pri sociologio, ankaŭ partoprenis en la plej gravaj strikoj okazintaj dum ĉiuj ĉi jaroj por subteni la idealon de siaj kamaradoj. Dum sia vivo li suferis kelkajn centojn da procesoj kaj estis diversajn fojojn enkarcerigita pro sia socialista propagando.

Li naskiĝis malriĉa, kaj malriĉa mortis. Li kune kun *Joaquin Costa* kaj *Pi Margall*, estas vera triologio de la plej honorindaj homoj el Hispanio, ĉiuj jam malaperintaj.

Ni SAT-anoj ne bezonas scii, kia estis lia socia tendenco, nur ni sciu, ke li trapasis sian tutan vivon batalante por encerbigi al la laboristaro ĝiajn rajtojn kaj devojn, pro tio do, ni ne povas forgesi honori lian memoron. *200 J. el Barcelono*

Pablo Iglesias kaj Esperanto

La ĵusmortinta ĉefpioniro de la hispana laboristaro estis tre favora al nia esperanta movado. Bedaŭrinde, kiam li eksciis pri Esperanto, jam li estis maljuna kaj malsana krom, kiel ĉiam, plenega de okupado.



Portreto de Pablo Iglesias; de Paŭlino Vicente

Tamen li parolis ofte favore al Esperanto, li legis atente kaj konstante la esperantan propagandon en la laborista ĵurnalaro, kaj li komprenis la valoron de Esperanto, por formi mondon liberan kaj fratan.

Lastajare mi sendis al li esperantan lernolibreton, kiun mi tiam estis publikiginta kaj, inter aliaĵoj, li respondis letere:

"Se mi havus la kapon pli forta, mi intencus lerni ĉiujn lecionojn pri Esperanto. Ni vidos, se mi plibonfartos; kvankam mi dubas ĝin . . ."

Efektive li, malfeliĉe, ne resaniĝis: la glora fondinto de la Socialista Partio en Hispanujo mortis la 9. decembro nuna en Madrido.

La laborista movado perdis antaŭbatalanton fervoran kaj la esperantistaro eminentan admiranton de la internacia lingvo.

Francisco Azorin, Ark. (Komitatano de la Hispana Socialista Partio)



Faru vian gazeton tia, kia vi ĝin deziras!



Kultur-laboro en profiligoj de BSSR

(Verkita nur speciale por "Sennaciulo")

A. Ŝilin

Je limo de du mondoj — respubliko de laboro kaj mortigata kapitalo kuŝas, kiel mallarĝa strio, malgranda respubliko (10600 kv. kilom.) Blankrusia Soveta Socialista Respubliko: oriente de ĝi estas RSFSR, okcidente ĝi limiĝis kun Polio kaj Litovio.

Komenciĝo de Blankrusio (en formo de litova blankrusia regno) rilatas al periodo de XIV jarcento. Komence de sia ekzistado Blankrusio troviĝis sub la regno de princoj kaj bienposedantoj, sed jam ĝis XVI. jarcento havis eblecon disvastigi blankrusan lingvon kaj kulturon.

Kiam en XVI. jarcento blankrus-litova regno estis aligita al Polio, tiam al ekonomia premo estis aldonita nacia premo. De tiu tempo aperis du lingvoj — "nuĵika" (kampula) — lingvo, kiun parolis blankrusa vilaĝanaro kaj "pana", lingvo de pola nobelularo, bienposedantoj.

Plu pligrandiĝis premo kaj jugo por blankrusa vilaĝanaro, kiu plej multe konsistis el vilaĝanaro de XVIII. jarcento, kiam Blankrusio submetiĝas al la superregado de rusaj caroj. Eĉ post jaro 1860 (jaro de liberigo, vilaĝanoj de bienhavanta premo) daŭrigis sian sklavan ekzistadon sub premo de bienposedantoj. Ankoraŭ nun maljunuloj bone memoras "leĝon de unua nokto" ("ĵus de prima nokto", *trad.)*, kiam bienhavanto prenis por unua nokto al si ĵus edziĝintan junan vilaĝaninon. Ankoraŭ nun vivantaj atestantoj rakontas pri tio, kiel kulpigis vilaĝanon, se li promenis en ĝardeno kaj tiu same malpurigis ĝin.

Blankrusio estis areno de la batalo en 1812. Viva korpo de blankrusia popolo estis disŝirita per fronto de imperialista batalo en 1914—18 j., kaj tero eksplodigita per kugloj, iloj kaj tranĉeoj.

En turmentoj kaj suferoj alvenis sovetregistaro. Revolucia movado en Blankrusio komencis en 80—90 jaroj de estinta jarcento, kaj poste ekzistis konstanta batalo de blankrusia laboristo kaj vilaĝano kun polico, ĝendarmoj, kun monarĥio, kun kapitalo. Kaj kiam rusa revolucio en februaro 1917 disfaligis monarĥion, Blankrusio estis dividita je 2 partoj. Unu estis en manoj de germanoj, alia estis aligita al Rusio. Germana revolucio 1918 liberigis Blankrusion el potenco de germanaj junkroj kaj 1. januaro j. 1919 estis enstarigita "*Sendependa Socialista Soveta Respubliko Blankrusio*". Sed ĝi ekzistis ne longe. Ĝi baldaŭ estis okupita per polaj oficiroj kaj bienhavantoj kaj nur en j. 1920 per nevenkebla volo de laboristoj kaj vilaĝanoj en ĝi denove enstariĝas sovetpotencon.

Ne estas granda Blankrusia Soveta Respubliko: pli ol 1000 kv. kilometroj kun 3 milionoj da loĝantoj dume troviĝas sub premo de pola bienposedantaro ĝemas

blankrusanoj, vice ĝemis antaŭe sub cara reĝimo sub politika, ekonomia kaj nacia premo.

Soveta Blankrusio havas 4000000 loĝantojn kiel kun ĝemantaj fratoj jam disrompita siaj ĉenoj laboristo kaj vilaĝano, laboristino kaj vilaĝanino konstruas novan vivon. BSSR estas lando vilaĝ-mastrumada, kamparana lando!

Preskaŭ 3/4 de l' tuta loĝantaro estas agrikulturanoj. Industrio estas disvolvita malbone kaj nur nun ĝi kreskas kaj kune kreskas laborista klaso. El akiranta industrio en Blankrusio estas disvolvita akiro de torfo. Je tiu fakto sovet-registaro turnis sian atenton, por elektriki landon kaj konservi arbaron. Kulturiga industrio estas prezentata en arbokulturigaj kemia, kulturigo de vilaĝ-mastrumada, produktoj, teksa kaj metala.

Dum imperialisma batalo kaj okupacio kulturiga industrio estis detruita kaj nur de 1924 ĝi vere malrapide, sed forte kreskas.

Kune kun tio nė estas granda kvanto de laboristoj, laboristinoj kaj oficistoj unuigitaj en profesiaj ligoj (sindikatoj) de Blankrusio. (Daŭrigota).

Laboristojn oni arestas en Finnlando

Pro agoj de finna aĉa "serĉa centra polico" multaj laboristoj estas arestitaj pro "spionado por Sovetrusio". Arestojn oni faris en Helsinki, Viipuri, Kothes, Tampere, Kemi Kuopio. La arestitoj estis plej agemaj anoj kaj gvidantoj de Socialista Junularasocio, ankaŭ estis inter arestitoj iu redaktoro de laborista gazeto. Ĉiujn ceterajn organizaĵojn de la nomita asocio oni fermis. Hejmserĉoj okazis, kaj kiel centra polico informas, multe da tre kulpiga materialo estas trovita. Oni konfiskis, kiel treege kulpigis — skribmaŝinon — kiu estas tre timinda ilo en manoj de laboristoj. Do en Finnlando estas malpermesita havi skribmaŝinon.

Tre notinde ankaŭ estas, ke la nomita instigado trovis favore sian lokon ankaŭ en finna "blankarmeo", kie oni ankaŭ arestis kelkajn soldatojn.

Denove venas procesoj kontraŭ laboristoj en Finnlando en "blanka tombo". Kiu vivas, vidas, ĉu per ili la patrujo estas defendita, sed malgraŭ ĉiuj defendadoj situacio estas necerta por lando, kiu estas apud vesuvo kaj kies propra grundo estas vulkana. *Vojaĝemulo.*

Ŝtatŝuldoj de Finnlando

Ne delonge oni informis en finnaj gazetoj pri ŝtatŝuldoj de la lando, kiuj entute sumas en fino de oktobro 1925 fmk. 2085672142. Sed konita ja estas, ke ĉi nombro estas nur sumo en librotenado kaj ke ŝuldo laŭ sumo de eksterlanda mono per nuna kurso estas rimarkinde pli granda.

Laŭ faritaj kalkuloj estus la ŝuldo fmk. 3657180000 aŭ fmk. 1171500000 pli granda ol valoro en libroj.

Ĉar loĝantnombro en Finnlando nune sumas ĉirkaŭ 3,5 milionoj da loĝantoj estus ŝtatŝuldo por ĉiu homo, eĉ infano 1045 fmk. Por komparo estu notita, ke en jaro 1914 estis la ŝuldo fmk. 171186038 aŭ kompare kun tiama loĝantnombro 52 ormarkoj po loĝanto. Se oni notas kiel valoro al la tiama ormarko 10 nunaj markoj ŝtatŝuldo estus duobliĝinta. Dum pasintaj 11 jaroj elspezoj por ŝtatŝuldoj estas rimarkinde pliiĝintaj.

En jaro 1914 rentoj kaj amortizoj enkalkulis 8,5 milionojn da ormarkoj aŭ 85 milionojn da nunaj markoj. En jaro 1924 ili estis 285,5 milionoj da nunaj markoj. Se norvega krono kaj pundo konservas sian nunan valoron, pliiĝos multe la elspezoj dum proksimaj jaroj. Al tio apartenas ankaŭ amortizoj de ŝuldo prenita en jaro 1921. *Vojaĝemulo.*

La konferenco pri komuna agado de tabaklaboristoj en urbo Plovdiv

Post kiam la fabrikantoj sukcesis malpliigi la salajrojn al tabaklaboristoj po dek procentoj kaj kiam la laboristoj vidis, ke ili jam neniun havas, kiu gardas iliajn interesojn kaj vidis, ke nuna bulgara registaro faras la malon. En tiu momento montriĝis inter gelaboristoj tre granda malkontento pri nuna registaro. La laboristaro jam komencis serĉi foje, por ke ili eliru el tiu ĉi malbona mizera stato kaj laboristoj ricevis inviton de libera tabaklaborista sindikato "Napred" ("Antaŭen") per kiu oni invitis la laboristojn konsenti, ke oni ambaŭflanke aranĝu konferencon por pripensi la demandojn, nuntempe plej interesiĝontajn la laboristojn: nome kiamaniere eliri el tiu ĉi mizera stato, kaj la demandojn pri kolektiva agado inter laboristoj. Kaj pli favoraj laboristoj respondis al ili, ke oni konsentu ilian proponon.

La konferencon malfermis la sekretario el libera sindikato "Napred" li raportis pri la malbona stato, en kiu nuntempe la tabaklaboristoj troviĝas. Ankaŭ li alvokis ĉiujn tabaklaboristojn pripensi la demandon ĉu fondi nuran tabaklaboristan organizaĵon aŭ li klarigis, ke ne estas necese alia organizaĵo, la laboristoj jam scias, ke estas "sindikato" en kiuj, ĉiuj laboristoj povas amase eniri. Se ili fondos alian organizaĵon, ili bone scios, ke nuna registaro malpermesas ekziston de tiu organizaĵo. Kaj ili alvokis, ke ĉiuj laboristoj eniru en ilian "Sindikato".

Venontan semajnon okazis dua konferenco kaj parolis k-do Piyev, membro de sindikato "Napred" kaj alvokis laboristojn, ke ĉiu laboristo estu membro de sindikato "Napred", ke ĝi nur povas gardi la intereson al laboristoj. Poste iu presisto, ankaŭ rekomendis liber-sindikaton "Napred" kaj invitis, ĉiujn laboristojn eniri. Poste li diris, ni estas ligitaj kun aliaj internaciaj laboristaj organizaĵoj. Ankaŭ ni ne estas kontraŭ rilatoj kun aliaj laboristaj organizajoj, sed por la bono al unueco, ni ne povas decidi pri la aparteneco. Poste oni elektis komision: kiun eniris la tuta estraro de laborista sindikato "Napred" kaj kelkaj laboristoj, kiuj estis devigataj prepari statuton pretaforma sur kiu kuŝas la nova konstruita organizaĵo.

Post tio ankaŭ oni kunvokis alian konferencon en kiu partoprenis pli multe da laboristoj. La elektita komisio, kiu preparis statuton, diris, ke oni nenion faris, ĉar oni ne povis konsenti kun kelkaj punktoj de la projekto.

Post tio ankaŭ la sekretario de centra libera sindikato rekomendis la libersindikatojn kaj diris kelkajn blasfemajn vortojn kontraŭ send. laborista organizaĵo, ke ĝi estas ankaŭ laborista. Sed li diris, ke en ĝi eniras pli multe kom. pro tio la nuna registaro ne konfirmas la statuton al tiu organizaĵo: pli bone estas eniri en la liberajn sindikatojn. Li parolis pli longe ol unu horo, sed nenion povas fari. Fininte la konferencon s-ro Piyev trovas pli bone resti nur kun la socialdem. partio kaj Amsterdamo. Finfine la laboristoj klare vidis, ke homoj de sind. "Napred" volis kapti fiŝojn en malpura akvo! sed vane, oni povis kapti ne eĉ unu fiŝon.

Unu semajnon post la konferenco la laboristoj el ĉiuj laborejoj elektis po unu personon, kiu prezentu la laboristojn antaŭ la urba estraro por peti, ke oni permesu al laboristoj aranĝi kunvenon, en kiu ili pripensas la demandojn: pri la senlaboreco kaj la demando: ĉu oni povis fondi sendependan tabaklaboristan organizaĵon: la urbestraro permesis al laboristoj kunvoki unu kunvenon. Post tri tagoj okazis tiu kunveno, en kiu la laboristoj elektis kelkajn personojn, kiuj estas taŭgaj por eniri en la societestraron de la sendependa tabaklaborista organizaĵo. En tiu ĉi kunveno oni metis la bazon al tiu organizaĵo. Ankaŭ oni unuanime voĉdonis unu rezolucion, kiu estis prezentata de unu laboristo, per kiu oni protestis kontraŭ senlaboreco. Kaj la rezolucio estis sendita al ministro de internaj aferoj ankaŭ al ministro de komerca afero ankaŭ al ĉiuj laboristoj kaj nelaboristaj gazetoj. Post tio la provizora estraro estis komisiita prepari la proj. kaj statuton kaj prezenti ĝin antaŭ la laboristoj por konfirmado.

Tiel tabaklaboristoj en Plovdiv trovis pli rektan vojon, kiu alkondukis ilin, al pli bona estonteco.

Kaj sindikato "Napred" restos "vivi" nur kun la arĥivo. *Z.*

Ekspozicio en Leipzig

La 13. ĝis 24. dec. 1925 okazis en Leipzig t. n. kristnaska foiro de la laboristaro. La loka Laboristara Kleriga Instituto kune kun Sindikata Kartelo aranĝis ĝin. La celo estis, montri la forton kaj povon de la laboristaro kaj ebligi la aĉeton de bezonaĵoj, libroj ktp. La ekspozicio okupis apartan halon.

Trairante ni vidas bone aranĝitajn kajutojn. Bonege impresas la ekspozejo de

la Konsum-kooperativo. Ĉi tie estas montrataj ĉiuj eblaj vivbezonaĵoj, vestoj, ŝuoj ktp. Tabeloj pri disvastiĝo de l' konsumkoopera movado pendas je la muro. Plue ekspozejoj de aliaj institucioj. La Sindikata Kartelo montras laboraĵojn de profesiaj lernantoj. Krom tio ankoraŭ ekspozas la Germana Sindikata Asocio, Liberpensuloj, Abstinenculoj, Respublika Ŝirmligo, Naturamikoj, Popola asekuro, Infanamikoj, Socialista junularo ktp. Kompreneble, la Lab. Esperanto-Grupo ankaŭ partoprenis. Ĝi havas grandan tablon, sur kiu kuŝas lernolibroj, esp. literaturo, la SAT-eldonaĵoj, gazetoj ktp. Je la muro pendas afiŝoj.

Entute, oni povas esti kontenta. La ekspozicio estis bone vizitata, precipe dum la dimanĉoj. La observantaj k-doj havis okazon propagandi buŝe al multaj personoj, kiuj pli frue ne interesis sin por esp-o. Sed nun, vidinte la rapidan progreson de esp-o ĉiurilate, ili ne plu volas resti indiferentuloj, nun ili komencas lerni esp-on. En januaro nova kurso estas malfermata, ankaŭ la socialista studenta grupo petis instruanton. La tuta aranĝaĵo estis praktika elmontro de la socialismo.

Willy Krey (5486)

RADIO

Antaŭ la I. Tutsovetia Kongreso de la Societo de Radioamikoj

La aparta karaktero de Soveta Ŝtato estas en tio, ke la potencon havas laborista klaso kaj gvidata de ĝi kamparanaro, kiuj ĉiutage partoprenas en diversaj regionoj de soveta konstruado.

Sur la teritorio de la granda Sovet-Unio estas malfacile trovi laboriston, kamparanon aŭ lernanton, kiuj ne partoprenus aktive en tiu aŭ alia regiono de soveta konstruado, partoprenante en tiu aŭ alia socia organizaĵo.

En la familio de amasaj sociaj organizaĵoj ne la lastan lokon okupas esence juna ankoraŭ, sed jam sufiĉe firmiĝinta, pruvinta sian vivkapablon kaj havanta brilegajn perspektivojn organizaĵo — Societo de Radioamikoj de USSR.

La Societo de Radioamikoj laŭ siaj taskoj, samkiel laŭ la enhavo kaj metodoj de sia laboro grave diferencas de la aliaj niaj sociaj organizaĵoj.

La amplekso de l' artikolo malpermesas al ni pli detale trakti tiun vere gravan rolon, kiun la Societo ludas jam nun en la kultura konstruado. Kiel oni scias, nia, la unua en la mondo, laborist-kamparana ŝtato, konsistanta el unio de Sovetaj Respublikoj kaj okupanta la sesonon de la tergloba kontinentaro, apartenas al la landoj malmulte ekonomie disvolvitaj, kun malforta reto de trafiko kaj interligo kaj, fine, nia unio konsistas plejparte el kamparanaro. Tial tute nature estas, ke unu el la ĉefaj taskoj en la regiono de kultura laboro de l' Unio estas likvido de l' analfabeteco, unu el pezaj heredaĵoj de l' care-burĝa sociordo.

La radioamatora movado, naskiĝinta antaŭ unu jaro en la plej industriaj regionoj, potenc-torente disvastiĝis tra la tuta teritorio de Sovet-Unio kaj nun estas jam malfacile trovi tian anguleton, kie forestus ĉelo de nia Societo kaj kie ne altiĝus super la tegmentoj la antenoj, konstruitaj, de laboristaj kaj kamparanaj manoj. Precipe ĝojiga estas en la sukcesa evoluo de l' radioamatora movado la agado de Societoj de Radioamikoj en la plej malproksimaj landekstremoj. En Ukrainio, Transkaŭkazio, Blankrusio, Turkmenistano kaj Uzbekistano ekzistas tiuj societoj, laborantaj en sia nacia lingvo kaj enirantaj en la Tutsovetian Union de l' Radioamikaj Societoj.

Ĝojige estas observi, kiel tiu ĉi multpromesanta movado ekkaptas ĉiutage novajn kaj novajn tavolojn de laborularo. Ni ricevas ĉiutage centojn da leteroj de radioamatoroj kun la plej diversaj informpetoj. Sed la plej bona vivecpruvo de l' Societo estas la cifero de ĝia membraro.

En la tago, kiam estas sendata al vi tiu ĉi artikolo, la ĝenerala nombro de niaj Societo-membroj superas 200000. Necesas atenti, ke en tiun nombron eniras ne tiuj radio-amatoroj, kiuj nur aŭskultas radion — da tiaj ni havas milionojn, — sed tiuj, kiuj de tago al tago per helpo de nia Societo mem lernas radioteknikon ĉe sennombraj kursoj, en rondetoj, kiuj konstruas mem akceptilojn kaj sendilojn.

Ĵus finiĝinta radio-ekspozicio evidentigis la grandegajn atingojn en laboro de radio-amatoroj. Ĝi montris, ke la krea kolektiva penso de niaj radio-amatoroj senlace laboras super la taskoj ne nur de radioteknika evoluo, sed ankaŭ por utiligo ĝia en la kultura laboro de vastaj amasoj.

Por resumi la jaran agadon de ĉiuj organizaĵoj de l' Societo, 25. jan. 1926 en Moskvo estas organizata la Unua Tutsovetia Kongreso de l' Societo. En tiu ĉi Kongreso, kies historia rolo estas senduba, estos reprezentitaj radio-amatoroj el plej malproksimaj landekstremoj. Ne necesas diri, kiel malpacience atendas radioamatoroj sian Kongreson. En la tagordo de la Kongreso estas kiel teknikaj, tiel ankaŭ organizaj problemoj, ligitaj kun agado de l' Societo. Krom tio la tagordo enhavas la punktojn pri stato de radioindustrio, radio-disaŭdigado, radiolaboro kaj radio-leĝaro, ankaŭ pri la internaciskala laboro.

La prezidantaro de la Societo *decidis inviti al la I. Tutsovetia Kongreso laboristajn radioamatorojn de okcident-eŭropaj landoj.* Nia internacia lingvo estas Esperanto. Nur per ĝi ni interrilatas kun ĉiuj radioamatoraj organizaĵoj alilandaj.

Utiligante la okazon, mi sendas varman saluton al ĉiuj radioamatoraj organizaĵoj de okcidento, kaj esprimas la certecon, ke iliaj delegitoj ĉeestos nian Kongreson.

M. Saltikov,
Sekretario de l' Societo de Radio-amikoj.

Radio-novaĵoj

Fondiĝis Unuiĝo de laboristaj Radioamatoroj, kiu celas utiligi radiotelefonon por klerigo kaj distro de ĝiaj membroj. Ĝi laboros en kontakto kun la Soc. Dem. Lab. Partio kaj la Ned. Prof. Asocio (N. N. V.). Ĉiusabate ĝi elsendos paroladojn, deklamojn, kantojn, muzikon ktp. per la sendstacio Hilversum. Sekretario de la unuiĝo estas G. J. Zwertbroek, Kejzersgracht 380, Amsterdam. *K.*

La Prezidantaro de la tutsovetia Societo de Radio-amikoj en la lasta sia kunsido decidis adopti Esperanton kiel sian oficialan lingvon por la rilatoj kun eksterlando, propagandante ĝin samtempe inter sia membraro. Tiucele en la oficiala presorgano de la Societo "Radio por ĉiuj", komencante de n-o 7 estas enkondukata konstanta Esperanto-angulo. Krome en la tagordon de la kongreso, kiun la societo organizas en januaro de 1926 estas metata la demando pri akcelo de Esperanto.

Tiun sukceson niaj alilandaj k-doj povus bone utiligi kaj plivastigi, se ili klopodus, ke radiamatoraj laboristaj organizaĵoj delegu al la nomita kongreso siajn reprezentantojn, parolantajn esperantlingve.

Estas interese noti, ke la oficejo de la Societo jam havas surstratan ŝildon kun sia nomo, redaktitan en Esperanto. *G. D.*

La plej grava laboro

por ĉiuj proleta esperantisto estu, servigi Esperanton al la proletaj organizaĵoj ĉiulandaj. Kvankam jam antaŭ kelkaj monatoj aperis alvoko tiucela, nur kelkaj k-doj anoncis sin. Ni denove alvokas vin, aktive partopreni tiun plej efikan peresperantan laboron. Almenaŭ ĉiulanda esperanto organizaĵo laborista komisiu po unu k-don, kiu nepre ekinterrilatu kun la "Prol. Esperanto-Presservo", Gerberstr. 24, H., *Leipzig* (Germanio).

Ĉinio, Japanio. Kio okazas en tiuj landoj, kiel statas la socia, ekonomia, politika movadoj. Proleta organizaĵo germana petis nin, havigi al ĝi tiajn raportojn. Sed ankaŭ por ĉiuj aliaj landoj tiaj raportoj estus tre valoraj. Do ankaŭ kaj precipe vi, ĉinaj kaj japanaj gek-doj estas petataj, sendi al la supre nomita presservo raportojn ktp. *Presservanto*

KORESPONDEJO

4265: Ricevis vian leteron.

5186: En tiu afero mi ne povas doni al vi informon.

607: Vi ankoraŭ ŝuldas 2.— kr. de 3. 1. 25. *Adm.*

3004: Via manuskripto ne estas uzinda.

3477: Via manuskripto alvenis, sed ĝis nun ne trovis lokon, ĉar ni preferas tiajn, kia estis la lasta. Ĝi nur aperos en okazo de bezono. *Red. Kom.*

≡ KRONIKO ≡

Aŭstrio.

Wien. Je la 14. de dec. okazis Zamenhof-festo aranĝita de iom neŭtrala esp-ista societo, kiu preskaŭ estas gvidanto de la tuta neŭtrala movado.

Parolis samideano, al kiu nenio mankis krom la pezo de la hodiaŭa sociordo, por ke ĝi almenaŭ por estonte, instigu lin serĉi fertilan (fruktoportan) grundon kaj semi nur fruktoportan semon.

ALLE, kiu efektive ekzistas, de post 18 monatoj ankaŭ aranĝis 2. feston, sed 2 tagojn pli frue kaj en ejo area 200 kvm. Kaj tamen ĝi estis plena! Sur la scenejo montriĝis gajaj kaj pensemaj vizaĝoj. La vortoj de k-do Prof. Simon estis modelaj: per Esp-o por socialismo.

Elektita semo falis en grundon, sur kiu eĉ dum vintro verdiĝos la folioj, ĉar ĝi estas varmigata de la liberecon portanta suno.

Ni ĝoju, se ili sukcesas — sed, jam ĉi-foje ni triumfis. *Poro*

Belgio.

Bruxelles. Nova kurso (la sesa) malfermiĝis en laborista sport- kaj edukklubo en antaŭurbo Anderlecht-Moortebeck, post konferenco kaj malgranda ekspozicio de libroj, ĵurnaloj ktp. Ĉe la unua leciono enskribiĝis 35 lernantoj.

Por la kurso per korespondado: 5 novaj enskribiĝoj. La grupo organizas perfektigajn kunvenojn kun legado, rakontado, tradukado. Ni klopodas orienti la gruplaboron al praktika per-esp. laboro. *SAT-ano 155*

Ĉekoslovakio.

Plzen. La Kompartio post peza laboro de niaj SAT-k-doj estis gajnita por la apliko de Esp-o kaj nun vigle propagandas ĝin inter siaj membroj; tiel la redakcio de "Pravda" decidis en sia gazeto aperigi rubrikon titolitan "De niaj esperantistaj korespondantoj el tuta mondo" la sindikato de ruĝaj metallaboristoj decidis aranĝi paroladon kaj kurson por Esp. por konduki siajn anojn al sennacieca pensmaniero. La redaktoro kaj ceteraj gvidantoj de Kompartio en urbo "Plzen" vigle subtenas kaj propagandas la Esp. movadon inter la proletoj, ĝis kiam la nombro de la kom. esperantistoj pli vastiĝos en Ĉeksl. "Pravda" aperigos esperantan rubrikon.

La kom. esp. en tiuj lokoj de Ĉeksl. estas petataj pere de la artikoloj kiuj aperas, regule en ĉiu n-o de "Pravda" agiti inter siaj k-doj por ke el ĉiuj lokoj de nia lando alvenu postuloj por apliko de Esp. Precipe ni admonas la eksterlandajn k-dojn, ke ili provizigu nin per konstantaj raportoj pri revolucia movado, strikoj, bataloj, faŝismo, kolonioj, kontrakto ktp. la artikoloj ne ampleksu pli ol 1/2 paĝon de "S-ulo" kaj estu ĉiam nur tre revoluciaj. Ĉiu korespondanto ricevos ekz. de la "Pravda" kun sia artikolo.

Sendu ĉion al k-do Burda R., Letna 152, Plzen., Ĉeksl.

Nederlando

Wormerveer. Karaj kamaradoj. — Ni komencas novan jaron. — Ni konkeris novajn multajn sukcesojn dum 1925. — Nia movado forte enradikiĝas en la ĝenerala laborista movado. — Wibaut, la financa soc. dem. — skabeno en nia ĉefurbo radio-parolis pri la neceseco de internacia lingvo, sed ĝi ne devas esti artefarita. Sinjoro Hoope el Leiden skribis kontraŭ li en la soc. dem. tagĵurnalo "Het Volk". Wibaut respondis. K-do Nathans, la dua sekretario de la Int.-transport-federacio poste per bela artikolo refutis Wibaut — kaj li diris en ĝi, ke li sekvis persone la diskutojn en la kongreso de SAT en Bruselo inter diverslandoj k-doj, kiuj okazis sen hezitoj. En la komunista tagĵurnalo "de Tribune" aperis la unua leciono de skriba kurso farita de la redakcio de suprenomita ĵurnalo. En ĝi ankaŭ aperas ĉiutage eksterlandaj per Esperanto ricevitaj komunikoj tradukitaj en holanda lingvo sub okulfrapanta rubriko "Laboristaj voĉoj el ĉiuj mondpartoj!" — Ankaŭ skriba kurso funkcias per korespondado tra la tuta lando kun 25 partoprenantoj el lernemaj legantoj de la kom. tagĵurnalo. Unu juna knabo jam sukcesis por diplomo A. dum unu lernojaro. Kvar plenaĝuloj en majo ekzameniĝos. Dum la provinca kunveno de la kom. junularo en mia regiono, kie ĉefestrarano Kees Kniper parolis pri sia vizito al Ruslando, subskribinto kiel "mezaĝulo" parolis kelkajn minutojn pri Esperanto kaj la tasko de la junularo internacie. — Lia paroladeto tiel efikis, ke la amsterdamaj delegitoj de la junula kom. Ligo "La semanto" tuj petis lian adreson por eble organizi buŝan kurson. La Profesia-fakmovado en nia distrikto ankaŭ organizos kurson. Nia movado do floros, progresas senripoze. Kamaradoj! Ĉie ni povas rimarki la reviviĝon de la laborista movado. Ni do lernu, studu, propagandu, instruu kaj gvidu nian lingvon inter ĉiuj rondoj de nia laboristara socio. Baldaŭ, pli baldaŭ ol ni kuraĝos esperi nia lingvo triumfos trans ĉia nescio, blindeco kaj ignoreco kaj Esperanto estos kaj estas la lingvo, kiu interfratigos ĉiujn kamaradojn sur la tero. —

Pro manko de loko ni estas devigataj lasi parton de "Kroniko" por sekvanta n-o. *Red.*

Denove pri neŭtralulaj temoj

S-ro Teo Jung en sia letero al la redakcio indignas pri nia artikolo "'Heroldo' de neŭtrala esperanta movado" (Senn. n-o 60 paĝo 4): "Ni povus, se ni volus, same moki pri artikoloj en via gazeto sed ni ne ŝatas tian facile havigeblan amuzon." Kvazaŭ ne komprenante esencon de la "mokoj" li penas pruvi, ke ni mokas nin mem (?!). Ĉar, unue, "Sennacieca Revuo" ankaŭ proponas pritrakti science-abstraktajn temojn kaj, due, mokante duonsemajnan aperadon de "Heroldo" ni forgesas, ke ni mem imitis(?) ET-on, semajnigante nian organon.

Ni devus bedaŭri pri absoluta miskompreno flanke de la sinjoro, se li fine ne dirus: "Ni aldonu, ke estas multe pli simple trovi materialon por politika partia gazeto ol por neŭtrala". La aldono mirinde koncize resumas preskaŭ tutan nian artikolon. Ĝi montras, ke la indigno aperis ne pro miskompreno, sed ĉar ni dolorige trafis Aĥilan kalkanon de l' ŝatinda gazeto. Ni nur devas korekti, ke "Sennaciulo" tute ne bezonas serĉi kaj "trovi materialon", ĉar ĝin abunde liveras laborista vivo mem. Sed neŭtrala gazeto ĝuste bezonas serĉi por si temojn kaj nepre trafos la sorĉitan cirklon de ridindaj neaktualaĵoj, kiel Zamenhofa parencaro ĝis la deka generacio aŭ egiptaj skaraboj. Kaj tiu bedaŭrinda situacio daŭros, ĝis kiam la gazeto penos kontraŭnature ekzisti en senaera spaco de l' neŭtralismo.

Konklude sinjoro Jung demandas, kiom helpus al ni se "Heroldo" iĝus "klaskonscie-ruĝa". Nu, per nia kritiko ni ja ne esperas "ruĝigi" Heroldon. Sed ni estas certaj, ke la duonsemajna gazeto gajnus multe da viveco, se ĝi demetus la senkoloran maskon kaj montrus sian veran vizaĝon. *F.*

Noto de la Redakcio

Krome saminteresa estas la prospekto, sendita kun Heroldo n-o 88 al multaj el niaj SAT-membroj, per kiu oni intencas akiri abonantojn inter laborist-esperantistaj vicoj.

Per tiu prospekto oni reklamas por la Popov-marko kun esp-lingva teksto, kiun Sovet-Rusio oficiale eldonis, oni vokas:

"*Sovet-Rusio estas la unua ŝtato, kiu oficiale eldonis poŝtmarkon kun Esperanto-teksto.*"

Tio estas ja tute vera. Samtempe oni reklamas por Heroldo, vokante:

"*Heroldo de Esperanto estas la unua Esperanto-gazeto, kiu, (jam la 21. okt. 1925) raportis pri tiu fakto.*"

Nun estas demando, ĉu konscia, ĉu nekonscia mensogo. Ni diras:

Sennaciulo raportis pri tiu fakto (jam la 8. okt. 1925).

Plua komento estas superflua.

Pri subkonferencoj de SAT

Ni scias, ke ekzistas inter ni iuj membroj opiniantaj, ke la *laŭsektora* organizaĵo de SAT jam nun estas foriginta kaj anstataŭinda per *nacilima* organizformo. Sed studante la spiritstaton de la laboristaro, eĉ sin nomiganta "klaskonscia", kiel sennaciulo oni facile konvinkiĝas, kiom da laboro ankoraŭ necesiĝas por forigi la arte enplantitan ideon pri eterna neceso de landlimoj. Multaj "Klaskonsciuloj" pensas, ke iam estas necese kanti sian *nacian* himnon. Tio laŭ mia opinio estas re danĝera, precipe en nia vivepoko, dum kiu prezentiĝis al ni la pli ol 4-jara hombuĉado inter la diversaj *nacioj*. *Nia* celo

estas *tutmonda unio* de l' laborantaro. Por propagandi tian ideon bonege helpas — la sektora landkarto de SAT.

Sed krome ni klopodu doni valoran internon al nia laŭsektora formo. Lasttempe ni rimarkis, ke okazis *SAT-konferencoj* por certaj *provincoj*. Ĉi fakton mi konsideras unuflanke kiel *progresan*, sed aliflanke kiel *malprogresan*. La ĉiujara ĝenerala kongreso ne estas vizitebla por multe da tre aktivaj 'gek-doj. Pro tio mi salutas la konferencojn dumjarajn aranĝitajn de pli malgrandaj SAT-rondoj. Sed preferinde, aŭ eĉ necese estas *forlasi* ĉe SAT-aranĝoj laŭnaciajn landlimojn, ĉar per tio oni forviŝus la tendencojn de nia *sennacieca* organizaĵo. (La naciaj propagandorganizaĵoj pravas kunveni nacilimece). Nek provinco, nek kantono, nek iu ajn alia laŭnacia organizformo estus aplikata por niaj aranĝoj. Spite, persiste kaj klarcele ni uzu *alian* formon. Jen ni posedas *sektorojn*! Ni vigligu la sektoran vivon! Multaj gek-doj, ne kapablaj veturi al la ĝenerala kongreso, ĝojus pri aranĝo de sektora konferenco. Se tia konferenco estus anoncita sufiĉe frue, ĝi ĝenerale estus verŝajne bone vizitata, ne nur de samprovincanoj, sed de ĉiam ŝatataj "eksterlandanoj". Tia kunveno ĉiam estus interesa, entuziasmiga kaj propagandiga samtempe por gastoj. Kiel konferenctagojn oni povus elekti bibliajn festtagojn (kristnasko, pasko, pentekosto). Interesaj referatoj kaŭzu viglan interdiskuton! Tiel ni edukus niajn gek-dojn spirite kaj lingve kaj krome ni bonmaniere eluzus la ŝajnkristemajn festojn.

Dubaptito.

Al kamaradoj geinstruistoj!

Nur unufoja alvoko

De kelkaj jaroj areto da instruistoj el Germanio, Francio, Rusio, Hispanio praktike uzas Esperanton por dokumenti diversajn pedagogiajn organojn. Ili sukcesis kunlabori en pedagogiaj redakcioj kaj akiri certan influon pro sia kompetenteco pri internaciaj instruistaj demandoj.

Pro tiu serioza laboro praktika postulante multan tempon kaj pro la pasiveco de multaj en faka laboro, preferantaj la ĝeneralan propagandon, estis duone forlasata la prizorgo de pedagogia rubriko en *Sennacieca Revuo* kaj pedagogia vivo de faka organo *Novaj Tempoj*.

Parte por vivigi la esperantistan pedagogian ekmovon, sed ĉefe por dokumenti Internacion de l' Instrulaboristoj kaj diversajn naciajn organizaĵojn — kaj tiel organizi nian peresperantan praktikan laboron mi surprenas la taskon starigi internacian esperantistan pedagogian servon.

Per ĉi tiu alvoko, mi min turnas al tiuj edukistoj, kiuj kunlaboras aŭ povas kunlabori en pedagogiaj redakcioj, kiuj havas influon ĉe ties redaktoroj, okaze siaj amikoj. Mi min turnas ankaŭ al la kamaradoj instruistoj, kiuj kvankam ne povante certigi pri utiligo de nia laboro povas dokumenti nin pri la instruistaj, lernejaj kaj pedagogiaj demandoj en siaj landoj.

Ni eĉ eventuale dankos helpon de needukistaj gekamaradoj, kiuj konigos al ni kompetentajn instruistojn, kiuj akceptus kunlabori en nia informservo. Povos okazi, ke needukistaj gekamaradoj povos grave kaj daŭre nin helpi perante niajn rilatojn per esperanto kun neesperantistaj pedagogoj gvidantaj organizaĵon aŭ gazeton.

Antaŭ ĉio ni alvokas al seriozaj kaj persistemaj kamaradoj. Oni evitu al ni iluzion kaj tempomalŝparon. Ne temas pri ia fantaziaĵo aŭ sensignifa provaĵo, sed pri entrepreno postulata de niaj nunaj laborkondiĉoj. De diversaj flankoj, pedagogiaj organizaĵoj sin turnis al ni petante

LA PLUVO

de *W. Doroschewitsch* el rusa de *B. G.*

— Hwangli, la nobla suvereno staris ĉe fenestro de sia porcelanpalaco. Li estis juna, tial bona. Ekpluvis. — Pluvegadis. Ploris la ĉielo, la floroj kaj la arboj banis sin en larmoj. Kompateme la nobla suvereno elvokis: "Tiuj fartos malbone, kiuj eĉ ne posedas ĉapelon". — Kaj li parolis al ĉambristo: "Volonte mi estus scionta, kiom da tiaj malfeliĉuloj ekzistas en mia Peking". — Ekgenuante kaj kapklinigante Tsungchitsang respondis: "Korifeo de l' tero! Ĉu je ekzistus neplenumebleco por la reganto de ĉiuj ĉinoj? Nobla suvereno! Ankoraŭ antaŭ sunsubiro, vi sciiĝos, kion vi deziras". — La nobla suvereno afable ridetis kaj la kortegano tuj rapidis al unua ministro Santschisan.

Li alvenis senspire, ne havante tempon, fari ĉiujn riverencojn, por la unua ministro. Spiregante li diris: "Nia nobla suvereno troviĝas en grava malkvieto. La friponoj malkvietigas lin, kiuj sen ĉapelo dum la pluvego ĉirkaŭiras en Peking, kaj ankoraŭ hodiaŭ li deziras sciiĝi, kiom da tiaj ekzistas". — Santschisan nur grumblis: "Jes tiaj friponoj jam ekzistas cetere." Kaj li venigis la urbestron Paichiwo. — Malbonajn novaĵojn el la imperiestra kastelo, la reganto de ĉiuj ĉinoj rimarkis malordojn!" Li diris, kiam Paichiwo kapkliniĝis teren. Timigite ekvokis Paichiwo: "Kiel? Ĉu la ĝardeno ne estas sufiĉe ombra, por kaŝigi la urbon antaŭ la rigardoj de nobla suvereno?" — Santschisan respondis: "Mi fakte ne scias, kio okazis; sed maltrankviligas friponoj kiuj ĉirkaŭiras sen ĉapelo dum pluvego, la noblan suverenon. Ankoraŭ hodiaŭ li deziras sciiĝi, kiom da tiaj friponoj ekzistas en Peking". — Unu minuton poste Paichiwo ekkriis al sia subulo: "Tuj venu al mi, la maljuna hundaĉo Chuardsung!" — Kiam la policestro tremanta falis antaŭ liaj piedoj, la mandareno surŝutis torente al lia kapo malbenojn: "Maljuna hundaĉo, maltaŭga fripono! Ĉu vi intencas, ke oni nin ĉiujn rostigu sur brulligna stako?" — Chuardsung tremante diris: "Diru al mi la kaŭzon de via saĝa kolorego, por ke mi povu kompreni viajn konsolajn vortojn, kiujn vi diris al mi. Alie mi timas, ke la lingvo de via saĝeco restas ŝlosita por mi." — Maljuna sentaŭgulo, al tiu pli konvenus gardi porkojn, ol gardi la plej grandan urbon de l' mondo! La nobla suvereno mem vidis, ke en via urbo ekzistas malordoj. Sur la stratoj vagadas friponoj, kiuj eĉ dum pluvo ne havas ĉapelojn sur la kapoj! Ĝis vespere sciigu al mi kiom da tiaj friponoj ekzistas en Peking!" Unu minuton poste, Chuardsung ekkriis kaj piedpuŝis la policistojn kiuj estis kunvokataj, per la surdigaj sonoj de l' tamtamo. — "Kanajloj, el tiuj mi pendigas la duonon, por ke la alia duono sciu kio okazos kun ili! — Tiel vi gardadas la urbon! Ĉe vi vagadas homoj sur la stratoj sen ĉapelo, eĉ dum pluvego! Dum unu horo devas esti kaptitaj ĉiuj, kiuj eĉ ne havas bambuan ĉapelon!" — La policistaro tuj plenumis la ordonon kaj dum unu horo en la pekingaj stratoj okazis fakte pelado. — "Kaptu lin! Tenu lin!" ekkriis la policistoj dum la ĉasado malantaŭ tiuj, kiuj ne posedis ĉapelojn. Ili eltiris la ulojn el bareloj kaj dompordegoj, eĉ el keloj, kie multaj sin kaŝis kiel la ratoj, persekutitaj de l' kuiristo, por fari el ĝi raguon. — Kaj dum unu horo ĉi-kiuj ne havis ĉapelojn troviĝis en korto de malliberejo. Chuardsung demandis "Kiom da tiaj ekzistas?" —

La servemaj policistoj respondis: — "20870!" — Chuardsung ekkriis: — "Ekzekutisto!" — Kaj post duona horo kuŝis 20870 senkapigitaj ĉinoj en mallibereja korto. La 20870 kapoj estis ĉirkaŭportitaj sur pikiloj en la urbo, por klerigado de l' popolo. — Chuardsung raportis al Paichiwo, Paichiwo al Santschisan, Santschisan raportis al Tsungchitsang. Vesperiĝis. La pluvo ĉesis. — La subiranta suno milde brilis, aliigis la gutojn sur folioj kaj floroj en brilantoj. — Kaj la nobla suvereno Hwangli staris ĉe fenestro de sia porcelanpalaco, ĝuis la belegan bildon kaj la bonodoron. Sed juna kaj bona, li ankaŭ ne forgesis la malfeliĉulojn dum ĉi tiu horo. Li turnis sin al Tsungchitsang kaj demandis lin. — "Vi do volis sciigi al mi kiom da homoj ekzistas en Peking, kiuj eĉ ne havas ĉapelojn, por ŝirmi sin, pro la pluvego." — Tsungchitsang profunde klinante sin respondis: "La deziro de l' suvereno de ĉiuj ĉinoj estas plenumita de siaj vasaloj!" — La suvereno demandis: "Kiom da tiaj ekzistas nun? Sed parolu la veron!" — En tuta Peking ne ekzistas eĉ unu ĉino ne havante ĉapelon por kovri sin dum pluvo. Mi ĵuras, ke mi diris la puran verecon!" — Kaj Tsungchitsang levis la manojn kaj klinis la kapon, kiel signo de l' sankta ĵuro. — Feliĉe ridetis la nobla suvereno. — "Feliĉa urbo! Feliĉa lando! Kaj kiel feliĉega mi estas, ke la popolo tiom bonfartas sub mia regado!" — Kaj ĉiuj en kastelo feliĉiĝis pro la feliĉo de l' imperiestro. Kaj Santschisan, Paichiwo kaj Chuardsung ĉiu el ili ricevis ordenon de ora drako, por ilia patra prizorgo por la popolo. —

informojn eksciinte pri nia faka laboro. Gravaj atingaĵoj jam okazis antaŭ kelkaj semajnoj en decidpovaj pedagogiaj medioj. Nia hodiaŭa propono estas nur metodigo kaj finorganizo de jam efektive de kelkaj jaroj funkcianta pedagogia servo.

La internacia esperantista pedagogia informservo funkcios jene de januaro 1926:

1. Ĉiu kunlaboranto verkas artikolon (minimume 100 liniojn) ĉiumonate pri landa aŭ ĝenerale instruista demando aktualeca.
2. Mi surprenas la taskon maŝinskribigi la tutan materialon ricevitan, ĝin multobligi sufiĉakvante, kaj sendi ekzempleron al ĉiu kunlaboranto senpage ĉiumonate.
3. Gazetoj Sennacieca Revuo kaj Novaj Tempoj ricevos regule ĉiumonate ekzempleron de la maŝinskriba materialo por siaj rubrikoj.

La temoj estu aktualaj, prefere pri landaj demandoj, ekzemple: Instruistaj landorganizaĵoj, historio, karakterizo, gazeto . . . La sindikatrajto kaj opinilibereco de la geinstruistaro . . . Salajroj, aparta situacio de la instruistinoj, lerneja ŝovinismo, religio kaj lernejo, preparo en la pedagogiaj lernejoj . . . Eksperimentaj, laboristaj, uzinaj lernejoj; biografio de famaj pedagogoj; infanmovado, ktp. . .

Kvankam starigo kaj funkciigo de pedagogia servo kostos al mi multan monon, mi senhezite deklaras, ke mi persisteme prizorgos ĝin kaj mi petas pri tio mediton de laboremaj instrukamaradoj. Ne aperos duan fojon tiu ĉi alvoko. Estus senutile. Interesatoj respondu tuj — antaŭ 15. januaro 1926. Gvidantoj de landaj kaj lokaj organizaĵoj esperantistaj, vi notu la ĉi malsupran adreson por estonte direkti novajn laboremulojn.

K-do *M. Boubou,* 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* Pl = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k. ĉ. l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Belgio

— "Gekursanoj k. grupanoj serĉas korespondadon k. ĉ. l. Resp. garantiata." Adresu al: K-do *P. Grignard,* Route de Stembert, 359, *Verviers.*

Ĉekoslovakio

— *Filatelistoj!* Mi interŝ. PM. nur indajn laŭ mankolisto. Ĉiam resp. Adr.: K-do *F. Hanuŝ,* Hrozuová, 8, *Praha III.*

Francio

— "*Esperantista Labor-Grupo*" Maison du Peuple, 35, rue Adam Ledoux, *Courbevoie,* dez. koresp. pri div. temoj, L., PK.

— K-do *Romain Arnaud,* Rue Paul Bert, 6, *Lyon,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri lab. movadoj, organizacioj k. kondiĉoj.

Germanio

Adresŝanĝo: K-do *Kurt Putz,* Viktoriastr. 11. ĉe Springer, *Eberswalde* (antaŭe en Strausberg). Samtempe mi petas miajn korespondantojn pardoni al mi mian longan silenton. Pro loĝejŝanĝo mi ne povis respondi.

— Esp. Sekcio de la "Turista Asocio" la naturamikoj, dez. koresp. pri ĉ. temoj L., Pl. k. l. Respondo garantiata. Adr.: K-do *Willi Agde,* Nordstr. 5, *Limbach i. Sa.*

— *SAT-grupo Harthau,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Adr.: K-do *Alfred Claussner,* Kunzstrasse 6, *Harthau b. Chemnitz i. Sa.*

— K-do *Fritz Teuber, Gödern b. Altenburg i. Th.* dez. koresp. k. ĉ. l. Pl.

Nederlando

— K-do *G. Schurink,* Nieuwstraat 24, *Enschede,* dez. kor. pri lab. vivo, moroj k. kutimoj k. esp. movado. L. Pl. nur kun Sibirio, Japanio k. Ĉinio.

Sovet-Unio

— "SAT-grupo" dez. serioze koresp. kun diverssektoraj SAT-grupoj k. SAT-anoj. Oni adresu al: K-do *V. Baĵenov,* Argunskaja, 47, *Ĉita,* Siberio.

— K-do *K. Faddejev,* Kamĉatskaja, 75, *Ĉita,* Sibirio, dez. koresp. kun k. ĉ. l. gejunuloj pri ilia vivo k. laboro. L., Pl.

— K-do *F. Kuĉinskij,* Krestianskaja, 23, *Ĉita,* Sibirio, dez. koresp. k. ĉ. l., ĉefe amerikaj, orientaj k. koloniaj, L., Pl., PM.

— K-do *D. Pogorelov,* Centr. Pravl. Sojuza Transportn. Dvorec Truda, *Ĥarkov,* pri politiko, ekonomio, vivo de laboristoj kaj kamparanoj.

— "Esp.-rondeto" dez. koresp. grupe aŭ individue pri temoj interesaj al laboristoj. Adr.: *Kruĵok Esperanto,* Klub im. Oktjabrskoj revolucij, *St. Poltava,* ĵuĵ. ĵel. dor.

— "Studentoj de Sport-Instituto" (adr. *Leningrad,* Mojka, 106, Institut Fiziĉeckogo Obrazovanija im. Lesgafta, Kruĵok Esperanto) dez. koresp. pri lab. sporto k. studenta vivo.

— K-do *I. Popov, Ekaterinovskoje poŝt otd.,* Taganrog. okr. Sev-Kavkaz.-Kraj. dez. koresp. pri prakt. kooperat. demandoj, agrikulturo, abelkulturado k. ĉ. l. L., Pl. nac. gaz.

— K-do *Libermann,* ul. Ĵukovskaja, 29, *Odessa,* dez. koresp. k. ĉ. l. L., PK., Pl.

— "Esp.-rondeto en milicana klubo" (komencantoj) dez. koresp. k. ĉ. l. pri interesaj al laboristaj demandoj. Adr.: *Leningrad,* Ploŝĉad Uriĉkogo, 8, Klub im. Urickogo, Kruĵok Esperanto.

— K-do *Andreo Sidorov,* N. strelkovij polk Dondivizij, *Rostov n/D.* dez. koresp. k. ĉ. l. L., PK., Pl.

Usono

Adresŝanĝo: K-do *Karl Fröding* (615), 221 Seventh Str., *Rockford,* (Ill.) (stratŝanĝo). Krom tio mi dez. koresp. kun lignaĵistoj en Francio k. Sovetio, kun studantoj de lingvoj, etnografio, vegetarismo, libera penso en ĉ. landoj.

Sovetiaj samasocianoj!

Por sukcesa propagando por SAT vi bezonas

nacilingvajn agitfoliojn pri SAT kaj la mondlingvo

Mendu ilin! Aperis 2a eldono de l' agitfolio ĉe:

"LABORISTA SOLIDARECO"
V. Kolĉinski, Kremenĉug.

„МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫК"

двухнедельный научно-популярный журнал

"INTERNACIA LINGVO"

duonmonata populara gazeto

por propagando kaj instruado de Esperanto

Oficiala organo de C. K. SEU

Programo: Popular-sciencaj artikoloj pri naturo kaj evoluo de lingvoj, teorio kaj historio de lingvoj internaciaj, historio de Esperanto, ĝia praktikado en laboristaj medioj, ampleksa lerna parto.

Senpaga aldono: Lernolibro de Esperanto de Iv. Lidin.

La plej valora propagandilo kaj lernilo por ruslingvanoj! Devo de ĉiu sovetia esperantisto estas abonigi tiun ĉi gazeton al neesperantistoj, kluboj, legejoj kaj aboni por si mem.

Abonprezo: 1 jaro **2 rbl.,** 6 mon. **1 rbl.,** 3 mon. **60 kop.**

Adreso: **C. K. SEU, Moskvo** (Sovet-Unio), Poŝtkesto n-o 630

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG